

La Sutro de la Budho de Nemezurebla Vivo

laŭ la ĉina versio de Saṃghavarman

佛說無量壽經

Esperanten trad. **Yamaguti Sin'iti**, Japanio

LA UNUA VOLUMO

[prefaco]

Tiel de mi estis aŭdite. Iam la Budho restis sur la supro de la monto Vulturo, en la reĝlando Raĵagriha.

[la aro de disĉiploj]

Tiam la Budho estis kun la granda kompanio el dek du mil bikŝuoj. Ili, ĉiuj eminentaj sanktuloj, kompletigis superhomajn kapablojn.

Ili estis nomataj: Kaundinja, Aŝvaĵit, Vaŝpa, Mahanaman, Bhadrīka, Vimala, Jaŝas, Subahu, Purnajit, Gavampati, Urvila-Kaŝjapa, Gaja-Kaŝjapa, Nadi-Kaŝjapa, Maha-Kaŝjapa, Ŝariputra, Maha-Maŭdgaljajana, Kalpina, Maha-Kauŝthila, Maha-Kauŝtjajana, Maha-Ĉunda, Purna, Anirudha, Revata, Kimpila, Mogharaĵa, Parajanika, Vakkula, Nanda, Svagata, Rahula, kaj Ananda. Ĉiuj ĉi bikŝuoj en la kompanio estis veteranaj disĉiploj.

[la aro de bodisatvoj]

La Budho estis ankaŭ kun multaj bodisatvoj mahajanaj. Inter ili estis la Bodisatvo Samantabhadra, la Bodisatvo Manĵuŝuri, la Bodisatvo Majtreja¹, kaj ĉiuj aliaj bodisatvoj en la nuna eono. La Budhon akompanis ankaŭ dek ses laikaj bodisatvoj, nome "Saĝa

¹Esperante, Majtrejo.

Protekto” kaj aliaj. Ankoraŭ ne mankis bodisatvoj el aliaj mondoj; ili estas nomataj “Bona Pripenso”, “Kredo kaj Saĝo”, “Spacosimila Neekzisto”, “Floro de Supera Kapablo”, “Radiluma Grapolo”, “Supera Saĝo”, “Flago de Saĝo”, “Radiko de Paco”, “Saĝo de Voto”, “Aroma Elefanto”, “Juvela Grapolo”, “Loĝanto en la Meza Vojo”, “Disciplina Konduto”, kaj “Liberiĝo”².

[virtoj kaj agadoj de bodisatvoj]

Ĉiu el tiuj ĉi bodisatvoj konforme al la sankta virto de la Bodisatvo Samantabhadra, enkorpiĝanto de universala saĝo, sin vestas per nemezureblaj votoj kaj praktikoj propraj al ĉiuj bodisatvoj, kaj posedas ĉiujn virtojn. Ili iras al diversaj lokoj, gvidas homojn per lertaj rimedoj, eniras en la trezorejon de la budha darmono, atingas la transan bordon, montras sin per la ok aspektoj en multege da mondoj, kaj tiamaniere vervekiĝas same kiel la Budho.

[la ok aspektoj de bodisatvoj]

(1) Ĉiu el la bodisatvoj unue disvastigas la ĝustan darmon en la dia mondo nomata *Tuŝita*³, (2) kaj poste forlasinte tiean palacon eniras en la uteron de la patrino. (3) Li naskiĝas el ŝia dekstra akselo kaj piediras sep paŝojn. Lia korpo lumas en brilego tiel, ke el ĉiuj mondoj en la dek direktoj mallumo forpeliĝas. La mondoj skuiĝas aŭ sonoras diversmaniere. Tiam li kun klara voĉo deklaras: “Mi mem, neniuj aliaj, fariĝu la plej supera sanktulo en tiu ĉi mondo.” Lin servas Indro kaj Braĥmo; lin estimas dioj kaj homoj. Li kiel reĝido majstras en matematiko, literaturo, arkpaŝado, rajdado, lernas artojn de supermondujoj, ellegas multajn librojn. En la ĝardeno li ekzercas sin en batalartoj kaj ekzamenas sian forton, dum en la palaca salono li vivas kun sensaj plezuroj.

(4) Baldaŭ ĉiu el ili tamen vidas la realon de kadukiĝo, malsaniĝo

² La bodisatvoj, kiuj havas la nomojn kun citiloj, ne aperas en la sanskrita versio. Tial oni ne scias iliajn sanskritajn nomojn. Mi tradukis ilin laŭ la signifo de ĉinaj ideogramoj.

³ La kvara el la ses diaj mondoj. Laŭ la hinda kosmologio ĝi situas super la monto *Sumeru*, la centra monto de la kosmo.

kaj morto; li ekkonas, ke la mondo ne estas konstanta. Li forlasas regnan riĉaĵon, rezignas tronon, kaj eniras en arbaron por ekpaŝi sur la vojo al la vera vivmaniero. Tiam li lasas al sia servisto kunporti al la palaco la blankan ĉevalon, sur kiu li ĵus rajdis, same kiel liajn juvelan kronon kaj ornamaĵojn. Li demetas siajn belajn vestojn kaj anstataŭe surmetas robon por bikŝuo. Li razas sian kapon kaj vizaĝon, medite sidas sub arbo kun strebado dum ses jaroj, praktikante proprajn kondutojn kiel asketoj. Tio signifas, ke ĉiu el la bodisatvoj intence naskiĝas en la mondo de kvin specoj da degeneroj⁴, vivas kun sensaj plezuroj same kiel aliaj homoj, kaj finfine tamen eniras en la puran akvon por forigi malpuraĵojn. Tiam dio fleksas branĉon malsupren por ke li helpe de ĝi povu supreniĝi al rivera bordo. Belaj birdoj sekvas lin, kvazaŭ ili estus liaj flugiloj ĝis la loko, kie li estas atingonta bodion. Sentinte la aŭreolon, ĉiela knabo oferas al li herbojn, kiujn li akceptas kaj sternas sub pipalon⁵ por mediti side kun rekta dorso. Tiam li radias grandioze tiel, ke marao⁶ ekscias, ke li estas atingonta bodion. (5) Marao kune kun siaj familianoj venas al li por malhelpi lin plenumi bodiĝon. (6) Sed li konkuras ilin per la forto de saĝo, kaj finfine li gajnas la subliman darmon kaj atingas la plej superan bodion.

(7) Tiam Indro kaj Brahmo aperas kaj petas de ĉiu el ili turni la darman radon, t.e. prediki por la bono de ĉiuj estaĵoj. Li, nun fariĝinta budho⁷, migras de loko al loko por ĉie ajn prediki kvazaŭ kun leona hurlo, batante la tamburon de darmo, blovante la konkon de darmo, prenante la glavon de darmo, levante la flagon de darmo, farante la tondrobruon de darmo, ĵetante la fulmon de darmo, verŝante la pluvon de darmo, kaj disvastigante la donacon de darmo.

⁴ Nome, (1) socia degenero, (2) furoro de malmoralaj ideoj, (3) vigliĝo de avidemo, kolero kaj idioto, (4) malaltiĝo de homa kapablo, (5) mallongiĝo de homa vivo.

⁵ Pipalo estas arbo (latine *Ficus religiosa*), ankaŭ nomata bodiarbo. (vikipedio)

⁶ *Mara*, (laŭvorte morto), iam nomata Sinjoro de morto, estas budhisma demono, kiu klopodis malhelpi al asketo Gautama (la estonta Budho) en vekigi. (vikipedio)

⁷ mi distingas <budho> de <la Budho>; la unua estas titolo de tiuj, kiuj atingis la plej superan bodion aŭ vervekiĝon, dum la dua indikas specifan budhon interalie fame konatan, ekzemple Ŝakja-munion (Gautama Śiddhārtha), Amitabo, k.a.

Ĉiam kun la sonoj de darmo li igas homojn de la mondo vervekiĝi. La brilanta lumo eliĝinta el lia korpo iluminas nemezureblajn budhlandojn kaj skuigas ĉiujn mondojn diversmaniere. La lumo atingas ankaŭ la regnon de maraoj kaj skuigas la palacon de maraoj. Tial ĉiuj maraoj teruritaĵoj ne povas ne sekvi budhon. Li forŝiras la reton de malĝustaj instruoj kaj forigas malbonajn ideojn. Li forbalaas la polvon de aflikto, detruas diversajn fosaĵojn de avidemo, strikte gardas la kastelon de darmo, kaj malfermas la pordon de darmo. Li lavas la poluadon de la mondo kaj klare montras la puran instruon. Li vaste proklamas la budhan darmon kaj kondukas viv-estaĵojn al la ĝusta vojo. Kiam li eniras en vilaĝon, li ricevas almozon kaj respekton de vilaĝanoj, kiuj akumulas virtojn per la donacado. Tial li estas nomata la kampo de feliĉo. Kiam li predikas darmon, rideto aperas sur lia vizaĝo. Per diversaj medikamentoj de darmo li kuracas la tri suferojn⁸. Li igas homojn ekhavi la rezultan decidon por la vojo al bodio kaj donas al ili nemezureblajn meritojn. Li instigas bodisatvojn gajni la plej superan vervekiĝon, promesante al ili, ke ankaŭ ili fariĝu budhoj.

(8) Ĉiu el la budhoj finfine montras sian aspekton de la plena nirvano⁹, sed la instruo senfine savadas viv-estaĵojn. Ĝi elradikigas diversajn kleŝojn, donacas diversajn bonajn semojn, kaj alportas meritojn tiel tute senreste, ke oni ne povas sondi ilin.

[praktikoj de bodisatvoj]

Ĉiuj bodisatvoj migradas multajn landojn kaj vaste konigas la veran instruon al viv-estaĵoj. Ilia praktikado estas pura kaj senmakula. Same kiel magiistoj aperigas la iluziajn figurojn de viro aŭ virino, aŭ aliajn ajnajjn figurojn laŭ sia prefero, tiel ilia profunda kono ebligas al ili libere krei diversajn aĵojn. Ili studas ĉian darmon radikale kaj komplete. Ili estas trankvilaj sur darmo studata kaj donas sian edifon al ĉiu ajn ĉie ajn. Ili povas montri sin en

⁸ (1) mensa aflikto aŭ korpa doloro (2) sufero sentata kiam io amata detruigigas (3) sufero sentata kiam oni ekscias ke ĉiuj komponaĵoj estas nedaŭraj.

⁹ En tiu ĉi kunteksto la plena nirvano signifas malestiĝon de kleŝoj kaŭzataj de korpo. Tial, tiu nirvano samtempas kun perdiĝo de korpo, nome morto.

nemezureble multajn budho-landojn. Ili ĉiam kompatas viv-estaĵojn, neniam tediĝantaj. Ili posedas tiajn kvalitojn kiel ĉi-supraj.

Ĉiuj bodisatvoj esploras ĝisfunde la esencon de sutroj, kaj ilia renomo disvastiĝas ĉie ajn, por ke ili povu gvidi viv-estaĵojn en la dek direktoj. Nemezureble multaj budhoj kune gardas ilin. Ili jam prenis la staton, kiu estas prenita de budhoj. Ili jam praktikis la vojon, kiu estas praktikata de grandaj sanktuloj, t.e. budhoj. Tatagatoj disvastigas la instruon ĉie ajn kaj fariĝas eminentaj gvidantoj de bodisatvoj. Tio ebligas al bodisatvoj siavice gvidi homojn kun la plej profunda meditado kaj saĝo. Ili komprenis la esencon de ĉiuj ekzistaĵoj kaj aspektojn de viv-estaĵoj. Ili klare rigardas ĉiujn landojn kaj oferas aĵojn al tieaj budhoj. Ili tie aperas kun fulma rapideco.

Ĉiuj bodisatvoj komplete ellernas sentimecon, komprenante ke ĉiuj ekzistaĵoj estas same kiel magie kreitaj aĵoj. Ili ŝiras la retojn de marao kaj malnodas ligitajn kleŝojn. Ili superis la staton de “disĉipla budho”¹⁰ kaj de “privata budho”¹¹ kaj gajnis la profundan koncentradon, en kiu oni ekkonas sen-enton, sen-aspekton, kaj sen-aspiron. Ili uzas la lertan rimedon por savi viv-estaĵojn kaj donas la instruojn konvenajn al la tri vehikloj¹². Al “disĉipla budho” kaj “privata budho” ili montras la aspekton de la plena nirvano, sed ili mem ne plu havas praktikendojn kaj serĉendojn. Ili gajnis la darmon pri ne-estiĝo, de ne-malestiĝo, kaj de egaleco. Ili posedas senmanke la kapablon por memori nemezureble multajn instruojn kaj plenumis la koncentradon per cent manieroj kaj mil manieroj. Ilia saĝo por koni kvalitojn de ĉiuj viv-estaĵoj estas tiel universala, ke ili penetras profunde en la trezorejon de darmo, gajnas la koncentradon nomatan

¹⁰ *śrāvakabuddha*: “disĉipla” (laŭlitere “aŭdanta” aŭ “aŭskultanta”) “budho”, iluminiĝinto en tempo kiam la darmo ja estas konata. (Gunnar Gällmo “kelkaj faktoj pri la budhismo”, Eldona Societo Esperanto, 2002)

¹¹ *pratyekabuddha*: ankaŭ iluminiĝinto sen alies helpo en tempo kiam la darmo ne estas konata, sed ne “ekmovanta la darmo-radon”. (ibid.)

¹² Temas pri la vehiklo de “disĉipla budho”, de “privata budho” kaj de bodisatvo.

“budho-girlando”¹³, kaj klarigas ĉiujn sutrojn manifestitajn de budhoj.

Ĉiuj bodisatvoj restante en la profunda koncentrado vidas estantajn nemezureble multajn budhojn de ĉiuj lokoj en unu momento. Ili savas diversajn suferantojn, ĉu ili havas tempon por praktiki budhan vojon aŭ ne, kaj al ili klare montras la limon de realo kaj vero. Ili gajnas la saĝan elokventecon same kiel diversaj tatagatoj kaj uzas diversajn parolmanierojn por gvidi ĉiujn viv-estaĵojn. Ili superas la diversajn fenomenojn aŭ esto-manierojn de la mondo sed ĉiam interesiĝas pri la vojo por savi la mondon. Ili estas liberaj kaj ne estas katenataj en ĉio ajn. Ili fariĝas amikoj de viv-estaĵoj, eĉ se ne petitaj. Ili prenas suferojn de viv-estaĵoj sur sin kiel siajn proprajn suferojn. Ili firme tenas la trezorejon de profunda tatagata darmo kaj gardas la semon de budheco en la interno de homoj, por ke ĝi ne rompiĝu.

Ĉiuj bodisatvoj simpatias al viv-estaĵoj kun granda kompatato, parolas kun filantoropia tono, kaj donas al ili la okulon de saĝo. Ili fermas la vojojn al narako, al malsatulujo kaj al bestujo, kaj malfermas la pordojn al homa mondo kaj al ĉiela mondo. Ili donas al viv-estaĵoj instruojn, eĉ se ne petitaj, tiel same kiel fidelaj gefiloj ame estimas siajn gepatrojn. Ili rigardas viv-estaĵojn tiel same kiel sin mem.

Ĉiuj bodisatvoj posedas ĉiujn radikojn de boneco kaj transiras la riveron cele al la bordo de perfekteĝo. Ili gajnas nemezureblajn meritojn de budhoj. Ilia saĝo estas sankta, brila kaj neimagebla. Tiaj ĉi bodisatvoj, grandaj saĝuloj, kiuj estas tiom multegaj, ke oni ne povas kalkuli la nombron, nun venis ĉi tien por aŭskulti la predikon de la Budho Ŝakjamunio.

[kvin virtoj de Ŝakjamunio]

Tiam la Bagavato Ŝakjamunio estis plena de ĝojoj, kun la figuro pura kaj kun la vizaĝo majeste brilanta.

La respektato Ananda stariĝis de sia sidloko instigite de la sankta

¹³ la koncentrado, sur kiu bodisatvo de la naŭa etapo predikas per multege da instruigaj metodoj.

intenco de la Budho, demetis sian robon sur la dekstra ŝultro¹⁴, genuiĝis, kunmetis la polmojn, kaj diris al la Budho, “Hodiaŭ vi, Bagavato, estas plena de ĝojoj, kun la figuro pura kaj kun la vizaĝo majeste brilanta, kvazaŭ hela kaj klara spegulo reflektus ambaŭ fronton kaj dorson de diafanaj objektoj. Via majesta figuro brilas nesupereble. Mi ĝis nun neniam vidis tian mirindaĵon, kian mi vidas nun. Ja, mi pensas en mia koro: (1) nun vi, la monda adorato, estas en la supera meditado; (2) nun vi, la monda heroo, estas en la budha sfero de iluminiĝo; (3) nun vi, la monda okulo, estas en la praktiko de gvidanto; (4) nun vi, la monda elstaranto, estas en la plej supera vojo; (5) nun vi, la ĉiela adorato, praktikas la virtojn de tatagato. Ĉiuj budhoj de pasinteco, de nuneco, kaj de estonteco imagas unu la aliajn. Ĉu ne estas tiel, ke ankaŭ vi, la nuna Budho, imagas ĉiujn aliajn budhojn? Se ne, kiel povus esti, ke via figuro eligas tiel majestan lumegon?”

La Bagavato diris responde al Ananda, “Kio okazis al vi, Ananda? Ĉu dio venis al vi instrukcii al vi demandi ĉi tiel? Aŭ ĉu vi mem demandis pro via saĝa juĝo?” Ananda diris al la Budho, “Ne dio instrukciis al mi demandi, sed mi demandis pri la signifo de tiu ĉi fenomeno, nur pro mia propra penso.”

[motivo de la budha apero en la mondo]

La Budho diris: “Tre bone, Ananda. Via demando ja kontentigis min. Vi prezentis tiun ĉi bonan demandon pri la signifo de mia brilanta figuro, kun via profunda saĝo kaj via vera talento de elokvento, pro via filantoropia sinteno al viv-estaĵoj. La tatagato turnas sin al la tri sferoj¹⁵ kun senkompare granda kompatato. La tatagato aperas en la mondo por disvastigi la budhan instruon kaj tiamaniere savi viv-estaĵojn kun la vera profito al ili. Estas tre

¹⁴ kutima maniero por montri respekton en antikva Hindio.

¹⁵ (1) la sfero de deziro, konsistanta el la ses mondoj, kies kategorio estas dio, homo, asuro, malsatulo, besto, kaj narako. (2) la sfero de pura materialo (3) la sfero de spirito super materialo

malfacile renkonti tatagaton eĉ dum miliardoj da kalpoj¹⁶; tio estas tre rara, same kiel udumbaro¹⁷ floras. Via ĵusa demando estas plena de profitoj al viv-estaĵoj. Ĝi povas enkonduki ĉiujn diojn kaj homojn en la veran vojon.”

“Ananda, vi sciu. La plej supera vervekiĝo de tatagato, kies saĝo ne estas mezurebla, gvidas multege da viv-estaĵoj. Lia saĝa pensado estas libera, senbara kaj nelimigita. Unufoja dieto sufiĉas por li vivi miliardojn da kalpoj, eĉ pli. Liaj organoj estas plenaj de ĝojoj, lia figuro estas pura, kaj lia vizaĝo estas nobla, sensanĝe. Kial tio eblas? Tatagato plenumas meditadojn kaj saĝon ĝisfunde, senreste. En kio ajn, li estas libera. Ananda, bone aŭskultu. Nun mi predikas por vi.”

Ananda respondis, “Jes ja. Mi aŭskultu vin kun plezuro.”

[la kvindek tri budhoj]

La Budho diris al Ananda: “En la pasinteco, antaŭ nemezureble multege da miliardoj da kalpoj, la Tatagato Dipankara, ‘Brilanta Lampo’, naskiĝis en la mondo por gvidi kaj savi nemezureblajn viv-estaĵojn, kiuj ĉiuj gajnis la veron kaj eniris en nirvanon. Poste aperis la Tatagato nomata ‘Lumo Lontana’. Poste ‘Luna Lumo’. Poste ‘Santala Parfumo’. Poste ‘Reĝo de Bona Monto’. Poste ‘Krono de Ĉielo Sumeru’. Poste ‘Brilo de Sumeru’. Poste ‘Luna Koloro’. Poste ‘Ĝusta Atento’. Poste ‘For de Makulo’. Poste ‘Sen Alteniĝo’. Poste ‘Ĉiela Drako’. Poste ‘Nokta Lumo’. Poste ‘Supro de Paca Lumo’. Poste ‘Senmova Tero’. Poste ‘Fajna Floro de Lazurito’. Poste ‘Ora Koloro de Lazurito’. Poste ‘Trezorejo de Oro’. Poste ‘Flama Lumo’. Poste ‘Flama Radiko’. Poste ‘Tera Movo’. Poste ‘Luna Figuro’. Poste ‘Suna Sono’. Poste ‘Floro de Liberiĝo’. Poste ‘Ornama Luma Radiado’. Poste ‘Supera Forto de Ocean-simila Vervekiĝo’. Poste ‘Akva Lumo’. Poste ‘Granda Parfumo’. Poste ‘For de Makulo-kaj-Polvo’. Poste ‘Forlaso de Intenco’. Poste ‘JVELA Flamo’. Poste ‘Fajna

¹⁶ Laŭ la hinduismo, la universo ekzistas tra senfinaj cikloj aŭ eonoj, nomitaj kalpoj. Laŭ unu hipotezo, unu kalpo daŭras 4.320.000.000 jarojn. La sanskrita termino estas *kalpa*. (vikipedio)

¹⁷ sanskrite *udumbara*. Ĝi indikas foje efektivan planton *Ficus racemosa* (unu speco de morusacoj), foje legendan planton, kiu onidire floras unu fojon en 3000 jaroj.

Supro'. Poste 'Brava Staro'. Poste 'Saĝo pro Tenado de Merito'. Poste 'Lumo Kovranta Sunon kaj Lunon'. Poste 'Lazurita Lumo de Suno kaj Luno'. Poste 'Senegala Lazurita Lumo'. Poste 'Plej Supera Ĉefo'. Poste 'Floro de Bodio'. Poste 'Luna Sereno'. Poste 'Suna Lumo'. Poste 'Reĝo de Florkoloro'. Poste 'Luna Bildo sur Akvo'. Poste 'Forigo de Tenebro de Malsaĝo'. Poste 'Transcendo de Obstakloj'. Poste 'Purigita Koro'. Poste 'Bono Restanta'. Poste 'Forto Neimagebla'. Poste 'Darma Saĝo'. Poste 'Voko de Feniksa Voĉo'. Poste 'Leona Hurlo'. Poste 'Draka Hurlo'. Poste 'Resto en Mondo'. Tiuj ĉi budhoj jam aperis kaj forpasis en tiu ĉi mondo."¹⁸

[apero de Darmakara]

"Poste estis la Budho, kiu estas nomata la Tatagato Lokeŝvararaĝa, 'Reĝo Libera en Mondo', alinome Arahato, Supera Vervekiĝinto, Plenuminto en Saĝo kaj Praktiko, Iranto sur Ĝusta Vojo, Komprenanto de Mondo, Senegalulo, Granda Edukanto, Gvidanto de Dio kaj Homo, Budho, kaj Bagavato¹⁹.

Tiutempe estis unu reĝo. Aŭskultinte la predikon de Lokeŝvararaĝa, li sentis en la sino profundan ĝojon. Tio signifas, ke li ekvolis paŝi sur la plej alta ĝusta vojo. Li rezignis la tronon kaj forlasis la regnon por fariĝi ŝramano. Li estis nomata Darmakara, 'Trezorejo de Darmo'. Liaj ekstremaj talento, kuraĝo kaj intelekto superis tiujn de aliaj homoj en la mondo. Li alvenis al la Tatagato Lokeŝvararaĝa, adorkliniĝis, metis sian frunton sur Lian piedon, rondiris ĉirkaŭ Li dekstrume tri fojojn, genuiĝis antaŭ Lin kun polmoj metitaj respekte, kaj laŭdis Lin per jenaj versoj:

[himno por laŭdi Lokeŝvararaĝa]

Via vizaĝo majeste brilanta;
via forto ekstreme neimagebla.

¹⁸ La budhoj ĉi tie listigitaj ne tute korespondas al tiuj en la sanskrita versio, escepte de Dipankara. Tial oni ne scias iliajn sanskritajn nomojn. Mi tradukis ilin laŭ la signifo de ĉinaj ideogramoj.

¹⁹ Temas pri la dek titoloj de budho. Sed se oni inkludas la titolon "Tatagato", entute estas dek unu titoloj. Tial estas kelkaj manieroj kalkuli, kiuj estas dek.

Via flamanta lumo ĉi-tia
havas nenion egalan kompareblan.
Eĉ suno, luno, gemoj,
aŭ perloj ne brilas,
kvazaŭ ili estas tuĉoj
tute kovrate antaŭ Vi.
Via nobla vizaĝo brilanta
superas mondon sen rivalo.
Via vervekiĝo supera laŭte
sonoras tra dek direktoj.
Viaj preceptaro kaj lernado,
strebado, meditado, kaj saĝo;
tiuj virtoj estas grandaj,
senegalaj, elstarantaj kaj raraj.
Vi ĝisfunde, klare, bone
meditis pri darma maro,
kiun estintaj budhoj instruas,
kaj atingis ĝian profundon.
Malvido, dezirego kaj kolero
ne troviĝas en Bagavato;
Vi heroo, kvazaŭ leono,
posedas neimageble superajn virtojn.
Viaj meritoj etendas vastege;
Via saĝo profundas sublime.
Majesteco de Via lumo
skuigas miliardon da mondoj.
Mi volas fariĝi budho
sekvante Vin, darman reĝon,
por liberigi ĉiujn viv-estaĵojn
el sufero, el naskiĝo-kaj-morto²⁰.
Donacemon, regadon de koro,
laŭpreceptan agon, paciencon, strebon,
meditadon kaj saĝon mi

²⁰ La cirkla viv-fenomeno de apero kaj malapero de ekzisto. En multaj budhismaj tekstoj ĝi estas preskaŭ samsignifa al iluzio kontraste al vervekiĝo. sanskrite: *jāti-maraṇa*.

plenumu ĝis perfekta stato.
Mi votas: fariĝonte budho,
mi nepre efektivigu ĉi-intencon:
doni al suferantaj estaĵoj
grandan trankvilon kaj pacon.
Da budhoj troviĝas multege
kiel sableroj de Gango;
eĉ se miliardoj, duiliardoj,
triiliardoj da ili troviĝas,
ol oferi al ili
pli bone estas bodion
serĉadi kaj neniel retropaŝi
kun firma ĝusta decido.
Da budho-landoj troviĝas multege
kiel sableroj de Gango;
da mondoj troviĝas multege,
kiuj ne estas kalkuleblaj.
Mia lumo tamen priradiu
ilin ĉiujn ajn senmanke;
mi strebu diligente sincere
por gajni majestan lumon.
Fariĝonte budho, mi faru
mian landon plej supera;
ĝia loĝantaro estu mirinda;
ĝia trejnejo estu laŭdinda.
Mia lando estu nirvano mem
kaj estu senegale supera.
Mi kun kompata koro
nepre liberigu ĉiujn estaĵojn.
Kiam ili estos venintaj
al mia lando, tiam
ili kun ĝojo puriĝos
kaj vivos komforte pace.
Mi petas, mia majstro:
bonvolu aprobi mian volon.
Jen estas mia ekzistokialo.

Mia voto estu plenumita.
Bagavatoj en diversaj direktoj
posedas perfektan senliman saĝon;
ili sciu mian volon,
ĉiam kaj ĉie ajn.
Eĉ se mia korpo
sinkus en dolorigan suferon,
mi pacience diligente strebu
al bodio, neniam pentante.”

[Darmakara kaj Lokeŝvararaĝa]

La Budho Ŝakjamunio diris al Ananda, “La bikŝuo Darmakara, fininte sian himnon, diris al la Budho Lokeŝvararaĝa, ‘Jes, ĉi tiel. Bagavato, ĉe mi ekis la decido serĉi la plej superan vervekiĝon. Mi petas, ke vi klarigu vaste la instruojn al mi. Sekvante ilin, mi min ekzercu por preni ĉiujn meritojn de diversaj budho-landoj, kaj faru mian propran landon bela kaj pura. Bonvolu helpi al mi rapide vervekiĝi en tiu ĉi mondo kaj forigi kaŭzojn de suferoj kaj de naskiĝo-kaj-morto.’”

La Budho diris al Ananda, “Tiam la Budho Lokeŝvararaĝa diris al la bikŝuo Darmakara, ‘Vi mem sciu budho-landojn, kies meritojn vi volas preni per via ekzercado.’ La bikŝuo diris al la Budho, ‘La signifo de ili estas tiel vasta kaj profunda ekster mia kapablo. Mi petas, Bagavato, ke vi detale klarigu al mi, kiel diversaj budhoj praktikis por kaŭzi siajn purlandojn. Aŭskultinte vin, mi praktikos laŭ via klarigo, por ke miaj votoj plenumiĝu.’ Tiam la Budho Lokeŝvararaĝa eksciis lian sinceran volon, donis al li instruojn, kaj diris, ‘Eĉ se unusola vi ĉerpadas akvon de oceano per sitelo dum multaj kalpoj, finfine vi atingos la fundon kaj tie trovos rarajn trezorojn. Tiel same, se oni strebas sincere senhalte al la vera vojo, ĉiuj povas finfine efektiviĝi sian celon. Neniu volo ne plenumebblas.’ Post tiu ĉi kuraĝigo la Budho Lokeŝvararaĝa klarigis al li avantaĝojn - malavantaĝojn de la loĝantoj en dudek unu miliardoj da budho-landoj kaj delikatecojn - maldelikatecojn de tiuj landoj, kaj tiamaniere montris ĉiujn ĝiajn trajtojn responde al lia voto.

La bikŝuo, aŭskultinte tion, kion la Budho diris, kaj observinte

pure solenajn landojn, ekhavis la senegalajn votojn. Lia koro nun estas trankvila, lia volo estas ligita al nenio. Neniu estas komparebla kun li. Kaj li meditadois dum kvin kalpoj kaj prenis purajn praktikojn por ordigi kaj ornami sian landon.”

Ananda demandis al la Budho, “Kiom da jaroj havis la Budho Lokeŝvararaĝa?” La Budho respondis, “Li havis kvardek du kalpojn. Nu, la bikŝuo Darmakara efektive prenis purajn praktikojn por ordigi kaj ornami sian landon, same kiel diversaj budhoj praktikis en la dukek unu miliardoj da superbaj landoj. Fininte sian praktikon, li alvenis al la Budho, adorkliniĝis, metis sian frunton sur Lian piedon, rondiris ĉirkaŭ Li dekstrume tri fojojn, kun polmoj metitaj respektive diris al Li, ‘Bagavato, mi jam prenis purajn praktikojn por ordigi kaj ornami mian landon.’ La Budho diris al la bikŝuo, ‘Nun vi ekspliku viajn votojn. Sciu, nun estas la tempo. Igu ĉiujn homojn aŭskulti vin, ekhavi sian esperon naskiĝi en pura lando kaj ĝoji pro tio. La bodisatvoj, kiuj aŭskultos vin, ekzercos sin en la darmo kaj plenumos sian grandan nemezureblan celon surbaze de la darmo.’

La bikŝuo Darmakara diris al la Budho, ‘Do, bonvolu favori min aŭskultante min kaj koni miajn votojn, kiujn mi nun detale ekspliku:

[kvardek ok votoj de Darmakara]

1. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum en mia lando ankoraŭ restas narako, malsatulujo aŭ bestujo.
2. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando post la fino de sia vivo refalas en la tri malbonajn sferojn²¹.
3. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj homoj kaj dioj en mia lando ne estas orkoloraj.
4. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando havas malsamajn trajtojn, ĉu belajn aŭ malbelajn.
5. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan

²¹ nome, narako, malsatulujo, kaj bestujo.

vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando ne posedas la kapablon ekscii okazaĵojn en pasinteco de eĉ dekiliardoj da kalpoj.

6. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando ne posedas la dian okulon antaŭvidi estontecon kaj trarigardi eĉ dekiliardojn da budho-landoj.
7. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando ne posedas la dian orelon aŭskulti ĉiujn sonojn en la mondo kaj ĉiujn vortojn de eĉ dekiliardoj da budhoj, kaj ne tenas ilin en sia memoro.
8. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando ne posedas la kapablon ekscii penson de la aliaj homoj, viv-estaĵoj en eĉ dekiliardoj da budho-landoj.
9. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando ne posedas la kapablon viziti laŭvole iun ajn landon, eĉ dekiliardojn da landoj en unu momento.
10. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando formas ian imagon kun deziremo al iuj objektoj kaj persistas ĉe sia korpo.
11. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando ne estas certigitaj, ke ili nepre vervekiĝos kaj atingos nirvanon.
12. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum mia lumo estas limigita kaj ne atingas eĉ dekiliardojn da budho-landoj.
13. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum mia vivo estas limigita kaj ne daŭras eĉ dekiliardojn da kalpoj.
14. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum disĉiploj en mia lando estas limigitaj kaj kalkuleblaj per la kunlabora kalkulado de ĉiuj disĉiplaj kaj privataj budhoj en la miliardoj da mondoj.

15. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando havas limigitan vivdaŭron, escepte de la okazo, ke ili volas libere decidi sian vivdaŭron laŭ sia voto.
16. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando aŭdas vortojn esprimantajn malbonon.
17. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum sennombraj budhoj en ĉiuj mondoj ne recitas laŭde mian nomon.
18. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj viv-estaĵoj, dezirante naskiĝi en mia lando, kun sincera kaj pura konfido vokas mian nomon eĉ nur dek fojojn kaj tamen ne naskiĝas efektive ĉe mi, escepte de la okazo, ke ili faris la kvin gravajn pekojn²² aŭ perfidis la ĝustan darmon.
19. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj viv-estaĵoj, havante la koron cele al bodio, praktikante diversajn moralajn agojn, kun sincera decidemo deziras naskiĝi en mia lando, kaj tamen mi ĉirkaŭite de multaj arahatoj ne aperas antaŭ ilin post la fino de ilia vivdaŭro.
20. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj viv-estaĵoj, aŭdinte mian nomon, konsideras pri mia lando, akumulas diversajn virtojn, utiligas ties meritojn por naskiĝi en mia lando, kaj tamen ne efektivigas sian deziron.
21. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando senescepte ne proprigas al si la tridek du gravajn budhajn trajtojn²³.
22. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan

²² (1) moritigi sian patron (2) mortigi sian patrinon (3) mortigi arahaton (4) vundi budhan korpon ĝissange (5) kaŭzi skismon en la samgo.

²³ Ekzemple, plata plando, plando kun la signo de rado el mil radioj, k.t.p. Ili ŝajnas esti misteraj trajtoj, probable alprenitaj el hinda mitologio pri sankteco.

vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj el aliaj budho-landoj veninte al mia lando ne atingas finfine la plej superan etapon, t.e. suplementan rangon de budhiĝo²⁴, escepte de la okazo, ke ili intencas resti en la rango de bodisatvo pro sia voto, ke ili sin oferu al viv-estaĵoj; nome en la okazo ili sin kovrante en la kiraso de firmaj votoj, akumulas diversajn virtojn, savas ĉiujn ajn, ekzercas sin en aliaj budho-landoj, respekte sin oferas al diversaj budhoj - tatagatoj, instruas al tiel multege da viv-estaĵoj kiel sableroj de Gango, kaj igas ilin atingi la plej superan vervekiĝon. Ili tiuokaze trapasas unufojon ordinarajn etapojn de bodisatvo kaj praktikas la kompaton de altrangaj bodisatvoj, interalie tiun de Samantabhadrā.

23. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando ne alvenas al aliaj sennombraj budho-landoj por respekte sin oferi al tieaj budhoj, helpate de mia forto, dum tiom mallonga tempo kiom unufoja manĝado.
24. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando ne povas enmanigi deziratajn ilojn por sinoferado kaj akumulado de virtoj antaŭ diversaj budhoj.
25. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando ne povas prediki pri la perfekta saĝo.
26. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando ne posedas tiom fortikan korpon, ke ĝi eltenas eĉ baton de diamanta bastono de la dio Narajana²⁵.
27. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum la preciza nombro de homoj kaj dioj,

²⁴ Suplementa rango signifas, ke bodisatvo post la fino de sia vivo jam ne ripetas renaskiĝon en iluzia mondo kaj finfine fariĝas budho. La plej fama bodisatvo en tiu ĉi rango estas Majtrejo, kiu laŭ la legendo aperos kiel budho post 5.67 miliardoj da jaroj.

²⁵ sanskrite *Nārāyaṇa*. Laŭdire, alinomo de Viŝnuo en hinduismo.

kaj ankaŭ de tiuj objektoj, kiuj estas ornamitaj pure kaj bele, glorie kaj bonorde, kun formoj kaj koloroj tre delikataj, estas kalkuleblaj aŭ difineblaj de iu ajn viv-estaĵo, kiu posedas la dian okulon.

1. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando, kiom ajn iliaj meritoj estas malmultaj, ne scias, ke la bodiarbo en mia lando disradias senfine kun la alteco de kvar milionoj da mejloj.
2. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando ne posedas la saĝon por elokventa predikado malgraŭ ilia studo, recitado kaj memorigo de mia instruo.
3. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando posedas nur limigitan saĝon por elokventa predikado.
4. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum la jeno ne okazas: mia lando pura spegulas komplete ĉiujn sennombrajn, nemezureblajn kaj neimageblajn budho-landojn en la dek direktoj de la universo tiel same, kiel oni vidas sian figuron reflektan en klara spegulo.
32. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum la jeno ne okazas: en ĉiuj sferoj, de la tero ĝis la ĉielo, ĉiuj palacoj, turoj, lagoj, riveroj, florarboj, kaj ceteraj objektoj en mia lando el sennombraj diversaj juveloj kaj el cent mil specoj da parfumoj; ornamaĵoj de mia lando estas mirinde raraj, super la imago de ĉiuj homoj kaj dioj; ĝia aromo disvastiĝas en la dek direktoj de la universo; bodisatvoj aŭskultinte tion ĉi, sin ekzercas en la budha praktiko.
33. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj viv-estaĵoj en la nemezureblaj neimageblaj budho-landoj en la dek direktoj de la universo, kiam ili estas tuŝitaj de mia lumo, tamen ne sentas sin flekseblaj korpe kaj mense, super la imago de ĉiuj homoj kaj dioj.
34. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj viv-estaĵoj en la nemezureblaj neimageblaj budho-landoj en la dek direktoj de la universo, kiam ili aŭdas mian nomon, tamen ne atingas la bodisatvan

vervekiĝon, nome la darmon pri ne-estiĝo kaj ne-malestiĝo, kaj firman tenon de budha instruo.

35. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum virinoj en la nemezureblaj neimageblaj budho-landoj en la dek direktoj de la universo, eĉ post kiam ili aŭdas mian nomon, ne ekhavas la koron cele al bodio, kun ĝoja konfido, kaj ne malestimas sian inan korpon, pro kio ili denove naskiĝas kiel virinoj post la fino de sia vivo.
36. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj bodisatvoj en la nemezureblaj neimageblaj budho-landoj en la dek direktoj de la universo, kiam ili aŭdas mian nomon, tamen ne restas en sia pura praktiko kaj finfine ne plenumas budhan vojon post la fino de sia vivo.
37. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj homoj kaj dioj en la nemezureblaj neimageblaj budho-landoj en la dek direktoj de la universo, kiam ili aŭdas mian nomon, tamen ne omaĝas kun tutkorpa riverenco, ne ekzercas sin en bodisatva praktiko, kun ĝoja konfido, pro kio ili ne estimas sin unu la aliajn.
38. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum la jeno ne okazas: homoj kaj dioj en mia lando laŭ sia volo gajnas sian robon, kiu estas konfirma al budha rekomendo; ili ne bezonas kudri, ripari aŭ lavi sian robon.
39. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum homoj kaj dioj en mia lando ne sentas tian saman ĝojon kiel bikŝuoj fortranĉintaj ĉiajn fluojn de karmo.
40. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum la jeno ne okazas: bodisatvoj en mia lando povas vidi laŭ sia intenco sennombrajn budho-landojn majeste ornamitajn en la dek direktoj de la universo; ĉiam ajn ili povas vidi budho-landojn reflektitajn sur juvelaj arboj en mia lando tiel klare kiel sian figuron sur spegulo.
41. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj bodisatvoj en aliaj budho-landoj, kiam ili aŭdas mian nomon, kaj ĝis kiam ili gajnas budhecon, suferas pro malpleneco de siaj korpaj kapabloj.

42. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum la jeno ne okazas: ĉiuj bodisatvoj en aliaj budho-landoj gajnas la koncentradon nomatan “pura liberiĝo”; ili restante en tiu ĉi mensa stato povu oferi sin al nemezureblaj neimageblaj budhoj-bagavatoj en unu momento sen perdo de sia koncentrado.
43. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj bodisatvoj en aliaj budho-landoj, kiam ili aŭdas mian nomon, tamen ne renaskiĝas en nobla familio post la fino de sia vivo.
44. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj bodisatvoj en aliaj budho-landoj, kiam ili aŭdas mian nomon, tamen ne ekzercas sin en bodisatvaj praktikoj kun ĝoja entuziasmo, por ke ili posedu virtojn.
45. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum la jeno ne okazas: ĉiuj bodisatvoj en aliaj budho-landoj gajnas la koncentradon nomatan “universala egaleco”; ili restante en tiu ĉi mensa stato povu ĉiam ajn vidi nemezureblajn neimageblajn budhojn ĝis kiam ili atingas sian budhecon.
46. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum bodisatvoj en mia lando ne aŭdas la darmon spontane laŭ sia volo.
47. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj bodisatvoj en aliaj budho-landoj, kiam ili aŭdas mian nomon, tamen ne alvenas al la etapo de ne-regreso²⁶.
48. Eĉ se mi estos fariĝonta budho, mi ne gajnu la plej superan vervekiĝon, tiel longe dum ĉiuj bodisatvoj en aliaj budho-landoj, kiam ili aŭdas mian nomon, tamen ne atingas la aspektojn de

²⁶ sanskrite *avinivartanīya*. Se bodisatvoj atingas tiun ĉi etapon, ili neniel regresas al pli malaltaj etapoj; do ĝi estas grava, ĉar ĝi garantias nepran budhiĝon al praktikantoj.

vervekiĝo²⁷, aŭ ne alvenas al la etapo de ne-regreso.”

La Budho diris al Ananda, “Kiam la bikŝuo Darmakara finis ekspliki siajn votojn, li faris jenajn versojn:

[himno por rekonfirmi la votojn]

Mi starigas votojn mondon superantajn;
mi nepre atingu superan vojon;
se mia voto ne efektiviĝas,
mi ne gajnu plenan verkekiĝon.
Mi dum miliardoj da kalpoj,
kiel granda donacanto, savu malriĉulojn;
se mia voto ne efektiviĝas,
mi ne gajnu plenan verkekiĝon.
Mia nomo disvastiĝu ĉie ajn,
kiam mi plenumas budhan vojon;
se mia voto ne efektiviĝas,
mi ne gajnu plenan verkekiĝon.
Forlasante avidemon kaj meditante profunde,
en puraj saĝo kaj praktiko,
mi celu al sensupera vojo,
mi gvidu diojn kaj homojn.
Kun majesta forto kaj lumo,
mi lumigu senfinan terenon universale;
forviŝante tri venenojn²⁸ pro kleŝo,
mi savu ĉiujn malfeliĉajn estaĵojn.
Kun okuloj de saĝo malfermitaj,
mi forpelu tiun blindan mallumon;
mi fermu pardonon al malbonoj,
kaj malfermu pardonon al bonoj.
Kiam mia strebado plene sukcesas,

²⁷ Kiam oni verkekiĝas, oni akiras la tri serenajn mensojn: akcepti la budhan darmon kun mensa trankvilo; sekvi la budhan darmon kun mensa fleksio; verkekiĝi je la vero pri ne-estiĝo kaj ne-malestiĝo.

²⁸ sanskrite *triviṣa*: avidemo, kolero, kaj malvido (aŭ stulteco)

majesta lumo radias dek direktojn;
suno kaj luno kaŝas sin;
dia lumo malaperas antaŭ ĝi.
Por viv-estaĵoj malfermiĝu darma trezorejo;
ili ricevu miajn vastajn meritojn.
estante ĉiam ajn inter popolanoj,
mi prediku darmon kiel leono.
Mi min oferu al budhoj,
havigu ĉiujn meritojn al mi;
votoj kaj saĝo plene pleniĝu;
mi fariĝu heroo en mondoj.
Same kiel budha saĝo senbara,
kiu lumas universale ĉie ajn,
ankaŭ mia virto kaj saĝo
estu plej honorinda kaj respektata.
Se miaj votoj fruktas finfine,
miliardoj da mondoj skuiĝu akorde,
kaj diaj estaĵoj en ĉielo
faligu ĉarmajn florojn kvazaŭ pluvo.”

[praktikoj kaj virtoj de Darmakara]

La Budho diris al Ananda, “Kiam la bikŝuo Darmakara finis ĉi tiel la himnon, la tero ĝustatempe skuiĝis per la ses manieroj. La diaj estaĵoj duŝis ĉarmajn florojn, kiuj falis sur la bodisatvon. Melodia muziko laŭdanta lin spontane aŭdiĝis: ‘Vi certe realigos la plej superan vervekiĝon.’”

“Jen la bikŝuo Darmakara surhavis plene tiujn ĉi grandajn votojn, kiuj estas veraj kaj realaj, ne falsaj nek vanaj, transcendantaj la mondojn, kaj alportantaj profundan ĝojon de trankvila sereno.

Ananda, tiam la bikŝuo antaŭ la Budho Lokeŝvararaĝa, inter la aro de diaj estaĵoj — maraĵoj, Brahmo, ĉielaj drakoj kaj aliaj — , deklaris siajn votojn. Ĵurinte ĉi tiel, li entuziasme strebadis por ordigi sian fajnan landon. La budho-lando, kiun li evoluigis, estas larĝa kaj vasta senfine, supera al ĉio ajn, unika kaj bonega. Ĝi estas eterna, senkaduka kaj senŝanĝa. Li ekzercis sin en senfinaj bodisatvaj praktikoj kaj akumulis virtojn dum neimageble multegaj kalpoj, ne

havante la sentojn de avidemo, de kolero kaj de malamikeco, nek la imagojn pri avidemo, pri kolero kaj pri malamikeco. Li ne alteniĝis al formo, sono,odoro, gusto, palpado kaj koncepto²⁹. Lia forto de pacienco estis tiel plena, ke li ne hezitis antaŭ diversaj suferoj. Li bezonis malmultajn aĵojn, malhavante mensan makulon, koleron kaj stultecon. Lia meditado estis konstanta kaj trankvila. Lia saĝo estis senbara. Li ne havis la inklinton al falso kaj flatemo. Lia vizaĝo estis milda kaj lia parolo estis amikema. Li komprenis la intencon de demandantoj jam antaŭ ilia ekparolo. Li estis brava en sia strebado kaj neniam tediĝis en sia firma decido. Li ĉiam serĉadis puran instruon, por ke li povu servi al popolanoj. Li adoradis la tri trezorojn³⁰ kaj servadis al sia majstro. Tenante mem grandajn meritojn kaj saĝon, li instigis viv-estaĵojn akumuli siajn virtojn.

Li restadis en la darmo de sen-ento, sen-aspekto, kaj sen-aspiro. Li ne inklinis al konceptigo kaj travidis la fakton, ke ĉiuj ekzistoj estas iluzioj. Li detenis sin de ofenda parolo, kiu vundas lin mem kaj aliajn. Li praktikis amplenan parolon, kiu profitas lin mem kaj aliajn. Li forlasis sian regnon, abdikis de sia trono, evitis riĉecon kaj sensajn plezurojn, praktikis la ses paramitojn³¹, kaj instigis ankaŭ aliajn praktiki ilin. Dum nemezureble multaj kalpoj li akumulis meritojn kaj virtojn. Kie ajn li renaskiĝis, li agis kiel liberulo. De lia ago spontane aperis nemezureblaj darmaj trezoroj, kiuj gvidis kaj firmigis sennombrajn viv-estaĵojn, por ke ili marŝu sur la sensupera ĝusta vojo. Iam li estis riĉulo, iam laika ekzercanto, iam brahmano³², iam aristokrato, iam kŝatrio, iam sankta reĝo de darma rado, iam estro de

²⁹ Tiun ĉi ses formas la kategorion nomatan "la ses objektoj", kiuj korespondas al la ses sensivoj (vido, aŭskulto, flaro, gustumo, palpo kaj konscio), laŭ la tradicia budhisma psikologio.

³⁰ Objektoj, kiujn budhanoj tra ĉiuj skoloj kultas: budho, darmo, kaj samgo.

³¹ Bezonataj praktikoj por bodisatvoj: (1) donacado (2) morala vivo kun disciplinoj (3) pacienco (4) strebado (5) koncentrado (6) perfekta saĝo

³² membro de tradicia pastra kasto de malnovhinda socio.

dia sfero el la ses niveloj de dia sfero³³, kaj iam Brahmo. Kio ajn li estis, ĉiam li respektis kaj oferis al ĉiuj budhoj la kvar materialojn³⁴.

Tiuj ĉi meritoj estas tiel multaj, ke oni ne povas kalkuli ilin. Lia buŝo elligas aromon de blua lotuso, kaj liaj poroj eligas aromon de santalo. Lia aromo penetras kaj disvastiĝas en sennombraj mondoj. Lia figuro estas eleganta, kaj lia vizaĝo estas bela. De liaj manoj ĉiumomente aperas neelĉerpeblaj juveloj, vestaĵoj, manĝaĵoj, trinkaĵoj, fajnaj florphumoj, baldakenoj, flagoj kaj aliaj materialoj por ornamado. Ĉio ĉi estas libere farita ĉe li, malsame ĉe aliaj diaj estaĵoj.”

[Darmakara kiel budho]

Ananda demandis la Budhon, “Ĉu la bikŝuo Darmakara jam fariĝis budho kaj plenumis nirvanon? Aŭ ĉu li ankoraŭ ne fariĝis budho? Kaj ĉu li nun estas?”

La Budho respondis al Ananda, “La bikŝuo Darmakara jam fariĝis budho kaj nun estas en la okcidento, for de ĉi tie trans dek duilionoj da landoj. Lia lando estas nomata ‘Paco kaj Feliĉo’.”

Ananda denove demandis, “Kiom da tempo jam pasis ekde tiam, kiam li fariĝis budho?”

La Budho diris, “Ekde lia budhiĝo ĉirkaŭ dek kalpoj pasis.”

[budho-lando de Darmakara]

“La grundo de lia budho-lando konsistas el la sep naturaj juveloj: oro, arĝento, lazurito, koralo, sukceso, agato, kaj tridakno. La lando estas vasta kaj senfina, kie la juveloj brilas reflektante unu la aliajn kaj miksiĝante inter si tre bele. Ĝi estas ornamita la plej pura kaj senmakula el ĉiuj mondoj en la dek direktoj. Ĝi estas la plej valora

³³ La tuta universo konsistas el la tri sferoj, el kiuj la plej suba estas la sfero de deziro konsistanta el la ses mondoj (vd. la piednoton 15). La dia sfero troviĝas tra ĉiuj tri sferoj, el kiuj la plej suba troviĝas en la sfero de deziro, kaj ĝi dividiĝas en la ses nivelojn.

³⁴ (1)manĝaĵoj kaj trinkaĵoj (2) vestaĵoj (3) litkovriloj (4) medikamentoj.

esenco de ĉiuj trezoroj; kvazaŭ trezoro de la sesa ĉielo³⁵. En la lando ne troviĝas la monto *Sumeru* nek la monto *Ĉakravada*³⁶, nek oceanoj, nek maroj, nek valoj, nek kavoj. Sed se oni volas vidi ilin, ili tuj aperas pro la neimagebla forto de budho. Kaj en la lando ne troviĝas narako, nek malsatulujo, nek bestujo, nek aliaj suferigaj cirkonstancoj. En la lando ne troviĝas la kvar sezonoj; tie estas ne varmege nek malvarmege, ĉiam milde kaj komforte.”

Tiam Ananda diris al la Budho, “Bagavato, se ne troviĝas la monto *Sumeru*, kie troviĝas la kvar gardantaj dioj³⁷ en la unua ĉielo aŭ la dioj en la dua ĉielo *Trajastrimśa*³⁸?”

La Budho diris al Ananda, “Kiel vi pensas? Se ne troviĝas la monto *Sumeru*, de kio dependas la ĉielo *Jama*³⁹ kaj aliaj ĉieloj ĝis la ĉielo *Akanista*⁴⁰?”

Ananda diris al la Budho, “Rekompencaj rezultoj estas super nia kompreno.”

La Budho diris al Ananda, “Se rekompencaj rezultoj estas super nia kompreno, ankaŭ budho-landoj estas super nia kompreno. Pro siaj meritoj kaj virtoj la viv-estaĵoj loĝas en lia budho-lando responde al siaj agoj. Ĝuste tiel rekompencaj rezultoj estas super nia kompreno.”

Ananda diris al la Budho, “Mi ne dubas pri tio ĉi. Mi demandis Vin pri tio ĉi, nur por ke estontaj viv-estaĵoj ne havu dubon.”

[lumo de la Budho Amitabo]

³⁵ sanskrite *para-nirmita-vaśa-vartin*. La plej alta ĉielo en la sfero de deziro. (vd. piednoton 33)

³⁶ Laŭ la hinda kosmologio tiu ĉi monto, kiu estas farita el fero, ĉirkaŭas la mondon, kie ni homoj vivas.

³⁷ Laŭ la hinda kosmologio ili loĝas en la kvar direktoj flanke de la monto *Sumeru* servante al Indro.

³⁸ sanskrite *trāyastriṃśa*. Laŭ la hinda kosmologio ĝi situas sur la pinto de la monto *Sumeru*.

³⁹ sanskrite *yāmāh*. la tria ĉielo en la sfero de deziro.

⁴⁰ sanskrite *akanistha*. la plej alta ĉielo en la sfero de pura materialo.

La Budho diris al Ananda, “Pro sia majesta kaj dieca lumo, la Budho de Nemezurebla Vivo, Amitabo⁴¹, estas la unua inter la honoratoj. La lumo de ĉiuj aliaj budhoj ne superas tiun de tiu ĉi Budho. Lia lumo radias en cent budho-landojn, mil landojn, aŭ eĉ pli multe: ekzemple en orientajn landojn multajn kiel sableroj de Gango. Tiel same sudajn, okcidentajn, nordajn, nord-orientajn, sud-orientajn, nord-okcidentajn, sud-okcidentajn, suprajn, kaj subajn. Lia lumo radias aŭ sep kolorojn, aŭ unu joĝanon⁴², aŭ du, tri, kvar, kvin joĝanojn. Tiamaniere konstante obliĝante, la lumo radias unu budho-landon.

Tial la Budho de Nemezurebla Vivo estas nomata ankaŭ la Budho de Nemezurebla Lumo, la Budho de Senlima Lumo, la Budho de Senbara Lumo, la Budho de Nekomparebla Lumo, la Budho de Flama Lumo, la Budho de Pura Lumo, la Budho de Ĝoja Lumo, la Budho de Saĝa Lumo, la Budho de Konstanta Lumo, la Budho de Neimagebla Lumo, la Budho de Neesprimebla Lumo, la Budho de Lumo super Suno kaj Luno.

Kiam viv-estaĵoj estas tuŝitaj de tiu ĉi lumo, la tri venenoj malaperas el ili; ilia korpo kaj menso fleksiĝas; kune kun ĝojo kaj entuziasmo bona koro naskiĝas en ili. Eĉ se ili estas en unu el la tri malbonaj sferoj, ili povas ripozi kaj sensuferiĝas per tiu ĉi lumo. Post la fino de la vivo ili ĉiuj liberiĝas el naskiĝo-kaj-morto.

La lumo de la Budho de Nemezurebla Vivo brilas kaj alvenas al ĉiuj budho-landoj en la dek direktoj de la universo; neniu malhavas la eblecon aŭdi ties nomon. Ne nur mi laŭdas lian lumon, sed ankaŭ ĉiuj budhoj, disĉiplaj budhoj, privataj budhoj, kaj bodisatvoj kune en harmonio laŭdas en la sama maniero.

⁴¹ Tiu ĉi ĉina versio tute ne havas la vorton “Amitabo” (阿弥陀), kiu estas populara nomo por ĉinaj kaj aliaj orient-aziaj budhanoj. Konsiderante, ke multaj legantoj ne scias, ke Darmakara estas la antaŭa nomo de Amitabo, mi enmetis tiun ĉi vorton, kiu ne troviĝas en la teksto. Ĝia sanskrita nomo estas *Amitābha*, kies origina signifo estas ne- (*a*) mezurita (*mita*) lumo (*ābha*), ĉine tradukite 無量光. Troviĝas alia fonto de 阿弥陀, t.e. *Amitāyus*, kies signifo estas ne- (*a*) mezurita (*mita*) vivo (*āyus*), ĉine tradukite 無量寿. Tial Amitabo estas kaj *Amitābha* kaj *Amitāyus* samtempe.

⁴² long-unuo en la antikva hindio. sanskrite *yojana*. distanco de unutaga marŝo la armeo. ĉ. 12-13 kilometroj.

Se viv-estaĵoj eksciinte, ke lia lumo estas plena de majesteco kaj virtoj, laŭdas lin tage kaj nokte senĉese, povas naskiĝi en lia lando laŭ sia volo; tiam ilian virton laŭdas bodisatvoj, disĉiploj, kaj aliaj sanktuloj kune en harmonio. Kaj poste kiam ili atingos la budhecon en la lando, ĉiuj budhoj kaj bodisatvoj en la dek direktoj de la universo laŭdos ilian lumon tiel same, kiel mi nun laŭdas lian lumon.”

La Budho diris, “Se mi eksplikas la majestan forton kaj noblecon de lia lumo eĉ tage kaj nokte dum unu kalpo, mi ne povas elekspliki ilin.”

[vivdaŭro de la Budho Amitabo]

La Budho diris al Ananda, “La longeco de la vivdaŭro de la Budho de Nemezurebla Vivo ne estas kalkulebla. Ankaŭ vi ne povas ekscii ĝin. Eĉ se ĉiuj viv-estaĵoj en la dek direktoj de la universo prenas homan korpon, fariĝus disĉiplaj aŭ privataj budhoj, kunvenus en unu asembleon, fervore meditus kun unu koro, eluzus siajn fortojn de saĝo, kaj dum miliardo da kalpoj kunlabore stokastike kalkulus la longecon, ili ne povas ekzakte ekscii ĝin.

La longeco de la vivdaŭro de disĉiploj, bodisatvoj, dioj, kaj homoj tieaj ankaŭ ne estas kalkulebla. Tio estas super aritmetiko aŭ metaforo. Kaj la nombro de disĉiplaj budhoj kaj bodisatvoj ne estas kalkulebla nek esprimebla. Ili havas saĝon klaran kaj profundan; ili havas forton majestan kaj liberan. Ili kapablas teni la tutan mondon en sia mano.”

[sanktuloj sennombraj en la budho-lando]

La Budho diris al Ananda, “La nombro de disĉiploj en la unua prediko de tiu ĉi Budho ne estas kalkulebla; ankaŭ tiu de bodisatvoj tiel same. Eĉ centoj da, miloj da, milionoj da, miliardoj da, tiel sennombraj kaj nemezureblaj saĝuloj kiel Maŭdgaljajana ne povas elkalkuli la nombron, eĉ se ili daŭrigas kalkuladon dum dekilionoj aŭ dekilionoj da kalpoj ĝis sia nirvano. Tio estas same kiel oceano; ĝia profundeco kaj vasteco ne estas mezurebla per tia maniero, ke iu homo disŝirus unu haron en cent harojn kaj ĉerpas unu guton el la

oceano per unu pecigita haro. Kiel vi pensas? Kioman proporcion okupas unu guto tiel prenita en la tuta oceano?"

Ananda respondis al la Budho, "Kompari unu guton kun oceano ne eblas per aritmetiko, nek per matematiko, nek per priskribo, nek per metaforo."

La Budho diris al Ananda, "Eĉ se saĝuloj kiel Maŭdgaljajana kalkuladus la nombroj de disĉiploj kaj bodisatvoj en la unua prediko de tiu ĉi Budho dum centoj da, miloj da, milionoj da, miliardoj da, eĉ dekilionoj da kalpoj, ili ekscius tiel malgrandan parton kiel unu guton en la oceano."

[arboj en la budho-lando]

"Kaj tiu budho-lando estas plena de diversaj arboj faritaj el la sep juveloj: oro, arĝento, lazurito, kristalo, koralo, agato, kaj tridakno. Kelkaj estas faritaj el du juveloj, aŭ tri, kaj tiel plu ĝis sep. Kelkaj arboj havas oran trunkon kaj arĝentajn foliojn, florojn kaj fruktojn. Kelkaj havas arĝentan trunkon kaj orajn foliojn, florojn kaj fruktojn. Kelkaj havas lazuritan trunkon kaj kristalajn foliojn, florojn kaj fruktojn. Kelkaj havas kristalan trunkon kaj lazuritajn foliojn, florojn kaj fruktojn. Kelkaj havas koralan trunkon kaj agatajn foliojn, florojn kaj fruktojn. Kelkaj havas agatan trunkon kaj lazuritajn foliojn, florojn kaj fruktojn. Kelkaj havas tridaknan trunkon kaj foliojn, florojn kaj fruktojn el aliaj juveloj.

Kelkaj juvelaj arboj havas purpur-oran radikon, blank-arĝentan trunkon, lazuritajn branĉojn, kristalajn branĉetojn, koralajn foliojn, agatajn florojn, kaj tridaknajn fruktojn; kelkaj havas blank-arĝentan radikon, lazuritan trunkon, kristalajn branĉojn, koralajn branĉetojn, agatajn foliojn, tridaknajn florojn, kaj purpur-orajn fruktojn; kelkaj havas lazuritan radikon, kristalan trunkon, koralajn branĉojn, agatajn branĉetojn, tridaknajn foliojn, purpur-orajn florojn, kaj blank-arĝentajn fruktojn; kelkaj havas kristalan radikon, koralan trunkon, agatajn branĉojn, tridaknajn branĉetojn, purpur-orajn foliojn, blank-arĝentajn foliojn, kaj lazuritajn fruktojn; kelkaj havas koralan radikon, agatan trunkon, tridaknajn branĉojn, purpur-orajn branĉetojn, blank-arĝentajn foliojn, lazuritajn florojn, kaj kristalajn fruktojn; kelkaj havas agatan radikon, tridaknan trunkon, purpur-

orajn branĉojn, blank-arĝentajn branĉetojn, lazuritajn foliojn, kristalajn florojn, kaj koralajn fruktojn; kelkaj havas tridaknan radikon, purpur-oran trunkon, blank-arĝentajn branĉojn, lazuritajn branĉetojn, kristalajn foliojn, koralajn florojn, kaj agatajn fruktojn.

Tiuj ĉi diversaj juvelaj arboj staras harmonie unu kontraŭ la aliajn kun siaj trunkoj, branĉoj, folioj, floroj, kaj fruktoj. Ili lumas tiel brile kaj flame, ke oni apenaŭ povas rekte vidi ilin. Fojfoje pura venteto fluas tra la arboj, kiuj sonas en la kvin tonoj⁴³. La sonado delikate akordas inter si.

Kaj la bodiarbo⁴⁴ en la lando de la Budho de Nemezurebla Vivo altas kvar milionojn da leŭgoj. La perimetro de ĝia trunko longas kvindek joĝanojn. Ĝiaj branĉoj kaj folioj disvastiĝas en kvar direktoj dudek mil leŭgojn. En tiu ĉi arbo ĉiuj specoj da juveloj spontane komponiĝas; la juvelo nomata "Lunlumo", la juvelo nomata "Teni Marcirklon" kaj aliaj reĝaj juveloj ornamas la arbon. Inter la branĉoj pendas juvelaj girlandoj kun centoj kaj miloj da koloroj, kiuj ĉiumomente varias kaj lumas blindume per sennombarj manieroj. Rare fajna reto de tiaj juveloj kovras la supron de la arbo. Ĉiu ornamaĵo aperas responde al nia deziro.

Kiam venteto blovas al la branĉoj kaj folioj, sennombraj sonoj de mirinda darmo estiĝas kaj disvastiĝas en diversaj budho-landoj. Tiuj, kiuj aŭdas la sonojn, akiras la profundan darmon pri ne-estiĝo kaj ne-malestiĝo kaj venas al la etapo de ne-regreso por atingi la budhecon. Ili posedas la orelojn purajn kaj ne renkontas doloron nek malĝojon. Iliaj okuloj vidas la formon de la arbo, iliaj oreloj aŭdas la sonojn, ilia nazo flaras la odoron, ilia lango gustumas la guston, ilia korpo sentas la lumon, kaj ilia koro ekhavas la darmon; tio faras la kondiĉon, ke ili ĉiuj akiras la profundan darmon kaj restas en la etapo de ne-regreso. Ĝis kiam ili atingas la budhecon, ili havas la ses sens-organojn kaj ne havas ĉagrenon nek malĝojon.

Ananda, homoj kaj dioj, kiuj vidas tiun ĉi arbon, akiras la tri

⁴³ En la antikva Ĉinio oni ludis la kvintonan gamon: C, D, E, G, A

⁴⁴ La arbo, sub kiu la Budho Ŝakjamunio vervekiĝis, nome bodiiĝis. Ĝia scienca nomo estas pipalo (*Ficus religiosa*). Ĉi tie la sutro aludas, ke ankaŭ Amitabo same kiel Ŝakjamunio bodiiĝis sub la arbo.

serenajn darmojn: unue la darmon kun mensa trankvilo, due la darmon kun mensa fleksebleco, trie la darmon pri ne-estiĝo kaj ne-malestiĝo. Tio ĉi eblas nur dank' al la majesta forto de la Budho de Nemezurebla Vivo, nome de la forto de la votoj, de la plenumiĝo de la votoj, de la klariĝo de la votoj, de la firma fondiĝo de la votoj, de la kompletigo de la votoj.”

[muziko en la budho-lando]

La Budho diris al Ananda, “Reĝoj en diversaj landoj povas aŭskulti centojn kaj milojn da specoj de muziko. Se kompari muzikon de ordinaraĵoj kun tiu de sankta reĝo Ĉakravart⁴⁵, kaj se kompari tiun de sanktan reĝon Ĉakravarti kaj tiel plu kun tiu en la sesa ĉielo, la lasta superas la antaŭan duilionoble. Sed unusola sono el la juvelaj arboj en la lando de la Budho de Nemezurebla Vivo estas nekompareble supera al eĉ la plej bona muziko en la sesa ĉielo. Kaj en tiu lando oni aŭdas nature sennombrajn fajnajn muzikojn, kiuj senescepte predikas la budhan darmon. Ili sonas klaraj kaj serenaj, mildaj kaj harmoniaj, estante la plej unuaj el ĉiuj muzikoj en la dek direktoj de la universo.”

[konstruaĵo kaj lageto en la budho-lando]

“Tie aŭditorioj, monaĥejoj, palacoj kaj kasteloj estas ornamitaj de la sep juveloj kaj komponitaj spontane. Kaj la kurtenoj faritaj el perloj, la juvelo ‘Brila Luno’ kaj aliaj valoraĵoj pendas de sur ili.

Inter kaj ekster, dekstre kaj live de tiuj konstruaĵoj troviĝas lagetoj por baniĝo; kelkaj el ili longas je la perimetro dek joĝanojn, kelkaj dudek, kelkaj tridek, kaj tiel plu ĝis centojn kaj milojn da joĝanoj. Sed la proporcio de la longo al la larĝo estas ĉie sama, kaj ankaŭ la profundo estas sama. La lagetoj estas plenaj de akvo, kiu havas la ok bonajn kvalitojn. La akvo estas pura, klara, bonodora, kaj gustas kiel nektaro.

Sur la fundo de la lagetoj faritaj el oro troviĝas sableroj el blanka

⁴⁵ sanskrite *cakravartiraajan*, laŭvorte: “radon turnanta reĝo”. En antikva Hindio oni kredis, ke tia reĝo estas ideala, ĉar li regas la mondon sen armiloj sed kun darmo.

arĝento; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el blanka arĝento troviĝas sableroj el oro; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el kristalo troviĝas sableroj el lazurito; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el lazurito troviĝas sableroj el kristalo; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el koralo troviĝas sableroj el sukceso; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el sukceso troviĝas sableroj el koralo; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el tridakno troviĝas sableroj el agato; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el agato troviĝas sableroj el tridakno; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el blanka perlo troviĝas sableroj el purpura oro; sur la fundo de la laĝetoj faritaj el purpura oro troviĝas sableroj el blanka perlo. Ĉe kelkaj laĝetoj la sableroj estas el du valoraĵoj, kelkaj el tri valoraĵoj, kaj tiel plu ĝis sep valoraĵoj.

Sur la bordoj de tiuj laĝetoj kreskas santaloj. Ili pendigas la florojn kaj branĉojn, disvastigante bonan parfumon tra la aero. Bluaj lotusfloroj, ruĝaj lotusfloroj, flavaj lotusfloroj, blankaj lotusfloroj, kaj tiel plu miksite inter si falas el la ĉielo kaj kovras surfacon de akvo. Se bodisatvoj kaj disĉiploj enirante en la juvelajn laĝetojn, volas trempi siajn piedojn en akvo, ĝi tuj venas al la piedoj; se ili volas trempi siajn genuojn en akvo, ĝi tuj venas ĝis la genuoj; se ili volas trempi sian talion en akvo, ĝi tuj venas ĝis la talio; se ili volas trempi sian kolon en akvo, ĝi tuj venas ĝis la kolo; se ili volas duŝi sin per akvo, ĝi spontane duŝas ilian korpon; se ili volas, ke akvo retroiru, ĝi tuj reiras al la originala stato. Ĝia malvarmeteco aŭ varmeteco harmonias kaj konvenas al ilia volo. Ĝi malfermas ilian koron, ĝojigas ilian korpon, kaj forigas la mensajn malpuraĵojn. Ĝi estas tiel pura, klara, kaj diafana, ke oni ne povas apenaŭ percepti ĝin. La sableroj faritaj el juveloj estas tiel brilantaj, ke oni povas percepti ilin, kiom ajn profunde ili troviĝas. La ondetoj cirkulas kaj enfluas unu la aliajn kviete, ne tre rapide nek tre malrapide.

La ondetoj eligas naturajn mirindajn voĉojn, kiujn oni senescepte aŭdas laŭvole. Kelkaj aŭdas la voĉojn predikantajn pri budho, darmo kaj samgo; kelkaj aŭdas la voĉojn predikantajn pri nirvano, pri ŝunjato kaj sen-atmano, pri granda kompato, pri paramitoj, pri la dek fortoj, pri sen-timo, pri la karakterizaĵoj propraj al budho, pri superhomaj kapabloj kaj saĝoj, pri senkatenaĵoj praktikoj, pri la vero pri ne-estiĝo kaj ne-malestiĝo, pri la vero super ne-estiĝo kaj ne-

malestiĝo, aŭ pri la bodisatvoj atingintaj la dekan stadion duŝataj per nektaro. Tiaj diversaj mirindaj voĉoj donas al la aŭdantoj senmezureblajn ĝojojn laŭ ilia volo; la aŭdantoj sekvas la instruon pri puro, sendeziro, nirvano kaj vera realo, sekvas la darmon pri la tri trezoroj, la dek fortoj de budho, sen-timo kaj la karakterizaĵoj propraj al budho, sekvas la vojon, sur kiu paŝas bodisatvoj kaj disĉiploj, kiuj havas superhomajn kapablojn kaj saĝojn.

Eĉ la nomo de suferoj en la tri malbonaj sferoj ne troviĝas en tiu ĉi lando; troviĝas nur sonoj naturaj kaj plezuraj. Tial tiu ĉi lando estas nomata 'Paco kaj Feliĉo'."

[naskiĝantoj en la budho-lando]

"Sciu Ananda, tiuj, kiuj naskiĝas en tiu budho-lando, havigas al si puran korpon, divers-tonan mirinda voĉon, superhomajn kapablojn, kaj virtojn. Iliaj loĝejoj, vestaĵoj, manĝaĵoj, trinkaĵoj, multaj belaj bonodoraj floroj, kaj ornamaĵoj spontane aperas same kiel tiuj en la sesa ĉielo. Kiam ili volas preni manĝaĵon, teleroj kaj potoj el la juveloj aperas antaŭ ilin laŭ ilia volo: nome, oro, arĝento, lazurito, tridakno, agato, koralo, sukceso, perlo nomata 'Brila Luno'. Centoj da specoj da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj spontane saturas la ujojn. Kvankam tiuj ĉi manĝaĵoj troviĝas, ili ne efektive manĝas; ili nur vidas la kolorojn kaj flaras la odorojn, tiel ke ili sentas sin manĝintaj. Ĉar ili estas sataj kaj kontentaj, ilia korpo kaj menso fariĝas flekseblaj. Ili ne havas intereson pri gusto. Kiam ili satiĝas, la manĝaĵoj nature malaperas, kaj kiam tempo venas, la manĝaĵoj denove aperas.

La budho-lando estas pura, paca, trankvila, fajna, mirinda, plezura, kaj ĝojiga; ĝi kondukas al la vojo de senkondiĉa nirvano. Tieaj multaj disĉiploj, bodisatvoj, dioj, kaj homoj havas altan kaj klaran saĝon, atinginte superhomajn kapablojn. Ili ĉiuj estas samformaj; nenia distingo troviĝas inter ili. La nomo de dio aŭ homo estas uzata nur koforme al la kutimo en aliaj landoj. Ilia vizaĝo estas nobla, rara, kaj eksterordinara. Ilia figuro estas fajna kaj mirinda, ne de dioj, nek de homoj. Ili ĉiuj posedas sian korpon sen formo, bodi-korpo sen-entan."

La Budho diris al Ananda, "Nun mi ekspliku la mirindecon de viv-estaĵoj en tiu budho-lando per ekzemplo; imagu malriĉulojn aŭ

almozulojn starantajn apud reĝo. Iliaj figuroj kaj statoj estas nekompareble diferencaj, ĉu ne?"

Ananda diris al la Budho, "Jes, se ili troviĝas apud reĝo, ili ŝajnas sovaĝaj kaj mizeraj tiel nekompareble, ke oni ne povas mezuri la diferencon gradon, kiu eble atingus centoblon, miloblon, milionoblon, miliardoblon, kaj tiel plu. Kial? Ĉar malriĉuloj kaj almozuloj vivas en la plej malalta viv-nivelo, ne havas sufiĉan vestaĵon por kovri sian korpon, manĝas apenaŭ por vivteni. Ili suferas pro malsato kaj malvarmo kaj vivas nehomecaj. Tion ĉi kaŭzis, ke ili en sia antaŭa vivo ne semis virtojn, ne donacis monon, kiun ili gajnis, fariĝis ju pli avaraj des pli riĉaj, celis nur kreskigi sian havaĵon, deziregis multon sen kontento, ne praktikis bonon sed akumulis monton da malbonaj agoj. Tiamaniere kolektita riĉaĵo forvapiĝas, kiam ili finas sian vivon. Malgraŭ la penado kolekti riĉaĵon sin doloriginte, ili sinkas en ĉagrenon pro la riĉaĵo; finfine restas al ili nenia utilo. Ilia riĉaĵo fariĝas vana por ili, transirante al aliaj. Ili ne posedas bonajn agojn, de kies meritoj ili ne povus dependi, nek virtojn, sur kiuj ili povus esperi sian feliĉon. Tial ili devas longe suferadi en la malbonaj sferoj, en kiujn ili enfalas post la morto. Ankaŭ post kiam ili finas tiean vivon, ili renaskiĝas en la homa sfero kiel malnobluloj stultaj kaj aĉaj kaj vivas apenaŭ homece. Aliflanke reĝoj en la mondo estas respektataj, ĉar ili akumulis virtojn en sia antaŭa vivo: donacis al popolo kun kompatato, savis popolon kun filantropio, faris bonojn kun sincera koro, kaj neniam konfliktis kun aliaj. Pro tio ĉi ili povis supreniri al bona sfero, la ĉielo, kaj ĝuas la nunan feliĉon kaj ĝojon. Ili estas rekompencitaj de siaj akumulitaj bonoj per tio, ke ili renaskiĝis kiel homo en reĝa familio kaj estas nature respektataj. Ili kondutas komplete, aspektas belaj; ĉiuj respektas servas al ili. Ili ricevas mirindajn vestaĵojn kaj manĝaĵojn laŭ sia volo, ĝuste pro tio, ke ili strebadis al virtoj en la antaŭa vivo."

La Budho diris al Ananda, "Vi pravas. Sed tiaj reĝoj, kiom ajn noblaj kaj elegantaj ili estas, aspektas malpli bonaj, se kompari ilin kun sankta reĝo *Ĉakravarti*; tio estas same kiel almozuloj kun reĝoj. Sed eĉ se sankta reĝo *Ĉakravarti* aspektas la plej digna kaj mirinda en la mondo, se kompari lin kun Indro, la ĉefo de la dua ĉielo *Trajastrimśa*, li estas pli aĉa miloble kaj milionoble. Kaj se kompari

Indron kun la ĉefo de la sesa ĉielo, la diferenco inter ili estas miloble kaj milionoble granda. Kaj se kompari la ĉefon en la sesa ĉielo kun bodisatvoj kaj disĉiploj en la lando de la Budho de Nemezurebla Vivo, la vizaĝo-korpo de la unua estas malpli supera ol tiu de la lastaj miliardoble, duilionoble, nekompareble.”

[ornamaĵo de la budho-lando]

La Budho diris al Ananda, “En la lando de la Budho de Nemezurebla Vivo al dioj kaj homoj ne mankas vestaĵoj, manĝaĵoj, trinkaĵoj, bonodoraj floroj, akcesoraĵoj, baldakenoj, flagoj kaj delikataj voĉoj. Loĝejoj, palacoj, kaj kasteloj estas tre diversaj laŭ eco de la loĝantaj sanktuloj. Iuj estas faritaj el unu speco de juveloj, aliaj el du specoj, aŭ sennombraj specoj. Ili tuj aperas antaŭ ilin laŭ ilia volo. Dioj kaj homoj paŝas sur mirindaj teksaĵoj el multaj juveloj sternitaj sur la tero. Sennombraj retoj el oraj fadenoj, perloj, kaj aliaj centoj aŭ miloj da diversaj juveloj, kiuj estas mirindaj kaj malofte videblaj, kovras la tutan budho-landon por ornami ĝin. Ili disvastiĝas en la kvar direktoj. El ili pendas juvelaj sonoriloj, kiuj blindige brilas kaj superbe koloras. Milde blovas natura vento kun virtoj, kiu ne estas varmega nek malvarma, estas varmeta kaj malvarmeta, estas komforta kaj harmonia, ne estas rapida nek malrapida. Kiam la vento blovas inter la juvelaj arboj aŭ retoj, darma sono kun sennombraj mirindaj tonoj sinsekve naskiĝas, kaj dek mil specoj da virta kaj mildaodoro disvastiĝas. Tiuj, kiuj aŭdas la sonon, ne havas kleŝon nek ĝian postefikon. Tiuj, kies korpo tuŝas la venton, akiras agrablan ĝojon. Tio estas same kiel bikŝuo akiras profundan meditado, en kiu menso kaj ĝiaj funkcioj estingiĝis.

Kaj kiam vento disŝutas florpetalojn, ili kovras la tutan budho-landon. Ili estas ordigitaj laŭ sia koloro, kaj la koloroj ne miksiĝas senorde. Ili estas molaj, graciaj, kaj forte aromantaj. Kiam oni metas sian piedon sur la tavolon de la petaloj, ĝi sinkas ĉirkaŭ kvar kolorojn, sed kiam oni levas sian piedon, ankaŭ la petaloj releviĝas kiel antaŭe. Kiam la florpetaloj finas sian rolon, la tero tuj malfermiĝas por enŝuti ilin. La tero estas tute pura sen resto de floroj. Tiamaniere ripetiĝas ventblovo kaj flordisiĝo ses fojojn en unu tago.

Lotusaj floroj faritaj el juveloj plenigas la landon. Ĉiu floro havas

duilionon da petaloj. La floroj brilas kun sennombraj koloroj. Blua koloro lumas blue, blanka koloro brilas blanke, kaj nigra, flava, ruĝa, purpura same. Ilia pompa kaj klara brilo ege superas tiun de la suno kaj la luno. Ĉiu floro eligas tridek ses duilionojn da lumoj⁴⁶. Ĉiu lumo eligas tridek ses duilionojn da budhoj. Ilia korpo estas purpura kaj ilia figuro estas unike superba. Ĉiu budho radias centojn kaj milojn da lumoj por prediki superan darmon al ĉiuj viv-estaĵoj en la dek direktoj kaj tiamaniere afablas konduki ilin al la ĝusta vojo, sur kiu budho paŝis.

⁴⁶ La menciitaj ses koloroj spegulas inter si, tial sesoblo de ses faras tridek ses. Tridek-sesoblo de duiliono (nombro de la floroj) faras tiun ĉi nombron. Tio simbolas la budhsiman filozofion, ke en unu troviĝas ĉio kaj ĉio troviĝas en unu.

固有名はサンスクリット語表記をエスペラントのアルファベットで示した。これは無量寿経がサンスクリット語で創作されたであろう事情による。エスペラント化に際しては、サンスクリットのhは保持し、長音記号は削除した。

翻訳の姿勢：基本的に直訳だが、随所に意味を補った。新語（日エスあるいはPIVにない語）の採用は極力控えるようにしたが、必要と判断した場合、脚注に示した。

[]に入れた小見出し、および（数字）は原文にはないが、理解の便宜のために補った。